



ni Diras Nun!

Sendependa Gazeto de la Esperanto-Movado

<http://revo.bierfaristo.com/onidirasnun/>

Esperanton Adoptita Mondskale!

Jam fina venko!

Sankta Luiso

Post longa laboro, ni atingis la celon en gloro! La esperantistoj, rekte kaj kuraĝe, sen flankiĝante, faris ke la mondo akceptu Esperanton. Krom du landoj en meza Afriko, kaj Francio, ĉiuj landoj en la mondo akceptis Esperanton kiel la monda interlingvo. Okazas festoj ĉie en la mondo (krom en Francio kaj tiuj mez-Afrikaj landoj).



"Ni semis kaj semis," diris Tim Westover, vic-prezidanto de Esperanto-USA, trinkante botelon da bieron sur tropika insulo. "Kaj, kvankam oni mokis nin kaj vokis al ni ĉesu, ni obstine iris antaŭen kaj atingis la celon en gloro."

"Mi devas diri," Westover aldonis, "Ni iam, fakte, laciĝis."

"Antaŭ nur du jaroj, estis kvazaŭ ni estis en densa mallumo," diris Filipino Dorcas, prezidanto de Esperanto-USA. "Sed nun, io ŝajne briletas. Mi ne certas kio ĝi estas."

Esperantisto Kaŝ-instruas Esperanton Ĉe Bobatona Lernejo

Esperanto-parolanto Jacob Schwartz riskis sorĉistinan atakon por kaŝeniri la Bobatonan Lernejon por instrui Esperanton al la lernantinoj. La Bobatona Lernejo famiĝis pro la libroj de J.K. Rowling pri Harry Potter. Sed la lernejon regas diktatura virino kiu absolute malpermesas la instruadon de Esperanto, ĉar ĝi povas "gvidi al tro fruan edziniĝon al la viroj de la malĝusta flanko de la magia fervojo." Jakobon sukcesis allogi dekojn da komencantoj antaŭ ol oni ŝanĝis lin al rano.



Speciala Raporto: Afriko

Cape Town

Intertriba milito ĉesis en Afriko sude de la Saharo. La landoj kuniĝis por formi Saharaj Tute-Unuiĝintaj Landaj Teritorioj Aliĝintaj (STULTA). La movado iniciatis ke Esperanto fariĝi la universala lingvo de ĉiuj nacioj en Afriko. Kaj kiel iras Afriko, iras nun la cetera mondo. Nun instruistoj por ĉiuj lernejoj estos bezonataj. Venontaj planoj inviti la Olimpikaj ludoj kreskas kiel pigmeo.

Granda kompromiso kondukas al monda interlingvo

New York



Post jarcento de agado, la movado por Esperanto kiel monda interlingvo ŝajnis atingeble dum la administracio de George W. Bush, post oni renomigis ĝin "La Libereco-Lingvo." Dirante "Kiu

povus esti kontraŭ libereco -- estus freneze," la prezidento promesis, ke li subskribus tian leĝon. Sed, la ekonomia krizo paŭzigis la aferon.

La nova prezidento, Barack Obama, proponis ke la nomo ŝanĝiĝu al "La Jes-Ni-Povas-Lingvo," sed tiun proponon alipartianoj kontraŭstaris, kaj ĝi ne antaŭis en la parlamento.

Tamen, konservativoj daŭre premis la aferon. "Se ni anstataŭigas mondan interlingvon por la franca kaj hispana en lernejoj, ni povus malaltigi impoŝtojn," diris pli ol unu parlamentariaon, anticipante je la malaltaj edukaj kostoj.

La aferon oni deligatis al "blu-ribanda" komitato de eks-eksterlandaj ministroj. Ili, per grandegaj klopodoj, atingis kompromison, kaj nia nova monda interlingvo naskiĝis en usono sub la nomo "Hope-eranto."

Ĉu lingvaj ratoj estas homaj ratoj?

New York

Sekureca Komitata debato pri lingvaj ratoj maltrankviliĝis pri la demando ĉu lingvaj ratoj estas homaj ratoj. Post ŝajne favorinte unu flankon, per atentigo, ke la Universala Deklaro de Homaj Ratoj ne mencias lingvajn ratojn, la ofico de la Sekretario Generala rapide karigis, dirante, ke "lingvajn ratojn oni devis vidi laŭ tuteca vidpunkto."



Ambasadoroj de ses landoj vokis por kreado de Alta Komisiito Por Lingvaj Ratoj, post la Alta Komisiito Por Homaj Ratoj neis uzon de la vorto "genocido" por priskribi la kreskantan uzon de kemiaj armiloj de homaj ratoj kontraŭ ne-homaj ratoj de ĉiuj specioj, inkluzivaj de lingvaj ratoj, en la keloj kaj kloakoj de urboj tutmonde.

Katastrofo ĉe Usona Landa Kongreso!

Saint Louis



Okazis terura katastrofo ĉe la Landa Kongreso de Esperanto-USA kaj mortis samideanoj kiam misfunkcio ĉe la komputilo de la direktoro de la Centra Oficejo kaŭzis longajn prokrastojn. Estis vicego da homoj kiuj volis aĉeti subskribitan ekzempleron de la nova libro Tim Westover. S-ro

Westover staris momente nur por streĉi la muskolojn, sed oni timis ke li foriras, kaj okazis fortegan hompremon kiu mortigis kelkajn homojn, inkluzive la Prezidanto de la Esperanto Societo de Okcidenta Ilinojo kaj la tuta membraro (du maljunaj virinoj) de Esperanto-Rondeto de Norda Oklahomo. Dekoj vundiĝis kaj devis iri al malsanulejo. Multajn librojn difektiĝis per sango.

"Estas tre bedaŭrinde," diris la direktoro de la Centra Oficejo. "Se la organizaĵo nur estus aĉetinta min Makintoŝon, tiu ĉi katastrofo estus tute evitebla."

Oni Diras Nun!

<http://revo.bierfaristo.com/onidirasnun/>

Oni Diras Nun estas malofta sendependa eldonaĵo de la usona Esperanto-movado. Ni pretas diri ĉion -- eĉ la veron, se necese -- pri la sekretaj vivoj de la plej famaj esperantistoj. La redaktoro bonvenigas viajn demandojn, leterojn, "onidirojn" kaj fotojn. Sendu al D-ro Istvan Bierfaristo; Redaktoro <bierfaristo@comcast.net>

Oni Diras Nun!

ATTN: D-ro Istvan Bierfaristo; Redaktoro
5 Fairfield Street
Amherst, MA 01002

